

Eŭropa Bulteno

februaro 2006, № 2 (44)

De la redakcio...

Karaj gelegantoj!

Kun plezuro mi informas vin ke la paĝaro de la 7-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio estis vizitita jam pli ol 550-foje. En la antaŭa monato venis ankaŭ unuaj aliĝoj, do krom el Slovenio en nia listo de aligxintoj estas ankaŭ esperantistoj de Pollando, Francio, Rusio kaj Hispanio.

Mi aparte invitas gejunulojn, kiuj povas ĝis la jarfino aliĝi al la kongreso sen kotizkosto, rigardi la ttt-on www.esperanto-maribor.si

Fakulojn pri scienca terminologio en Esperanto kaj pri akvo kaj naturo, mi petas rigardi la menciitan ttt-on kaj kunlabori ĉe preparado de la programo. Ĉiuj ideoj estas bonvenaj. Kaj ĉiuj esperantistoj estas bonvenaj.

Mi kore salutas vin el Maribor nome de la Organiza komitato de la kongreso.



Kaj certe, agrablan legadon de la Bulteno!

Vesna Obradović

EEU-ESTRARO VIRTUALE KUNSIDAS




La estraro de EEU ekde januaro 2006 uzas modernajn teknologiojn por siaj kunsidoj – nome oni ekis uzadi la programon Skype (www.skype.com), kiu ebligas „virtualajn konferencojn“ (en kiuj povas samtempe ĉeesti maksimume 5 homoj) porvoĉe kunsidi kaj plani ontajn paŝojn, gravajn decidojn, strategion. La plano estas utiligi ilin ĉiun duan semajnon – kaj tiel pli flekseble, rapide kaj efike labori por nia komuna celo. Tiaj kunsidoj estas samtempe efikaj – ĉar ja ebligas rektan kontakton de la homoj, kiuj vivas dise tra la mondo, kaj tute senkostaj (krom la kostoj de interreto) – ĉar la programo ebligas (krom aliaj aferoj) senpagan telefonadon inter la interret-uzantoj.

La programon jam uzas multaj esperantistoj, sed ĝis nun ne estas konate, ke iu organizo E-ista uzus ĝin oficiale kiel komunikilon por pliefikigi sian laboron.

Peter Baláž

Okazaĵoj...**LINGVISTOJ EN LONDONO**

Vendrede (17.2.2006) oni invitis min prelegi ĉe kunveno de lingvistoj en Londono. Temas pri projekto de la Eŭropa Komisiono pri la instruado de keltaj kaj regionaj lingvoj eksterlande, kaj ĉeestis reprezentanto de la Komisiono (portugalino) kaj iom pli ol 24 profesoroj de keltaj kaj aliaj lingvoj.



En mia prelego mi substrekis la lernfaciligajn ecojn de Esperanto, kiuj estas ege bezonataj en la Irlanda situacio, kie 70% de la infanoj en anglalingvaj bazaj lernejoj (94% de ĉiuj bazaj lernejoj) ne atingas la celojn de la irlanda lingvolernado. La direktoroj de la lingvaj centroj en la universitatoj de Belfasto (Nord-Irlando) kaj Má Nuad montris intereson al la ideo de Esperanto kiel lernofaciliganto. Ambaŭ estas ege malkontentaj pri la nuna instruado de fremdaj lingvoj en irlandaj lernejoj: oni lernas gxin nur dum unu aŭ 2 horoj semajne, kaj la plimulto memoras preskaŭ nenion post iom da tempo. Mi substrekis la eblan kontribuon de la projekto de la Esperanto-Asocio de Britio, "Springboard" www.springboard2languages.org/home.htm) al

plibonigo de tiu situacio, kaj aranĝis diskuti la ideon kun la reprezentantino de la Komisiono en Bruselo dum la venontaj semajnoj.

Seán Ó Riain

Prezidanto de EEU

DEA-PARTOPRENO EN LA DANA SOCIA FORUMO

Dana Esperanto-Asocio partoprenis la Danan Socian Forumon kiu okazis de la 3-a ĝis la 5-a de februaro en Kopenhago sub titolo: "Alia mondo eblas". Estis invititaj ĉiuj danaj NRO organizadoj kaj asocioj kiuj laboras por la homaj rajtoj kaj paco. Okazis pli ol 100 prelegoj, kaj DEA partoprenis kun du prelegoj emfazante precipe la lingvajn homajn rajtojn:



"Lingvomortigo" prezentitan de dr.phil. Tove Skutnabb-Kangas kaj "Ĉu la tutmondigo signifas ke la dana lingvo malaperos?". "Lingvoj de elmigrintoj en Danlando" estis prelego de prof. Robert Phillipson en kunlaboro kun Ole Stig Andersen, kiu reprezentis la danan UN-Asociacion. La ĉeestantoj estis treege interesitaj kaj faris multajn demandojn al la prelegantoj.

DEA aranĝis ankaŭ budon kaj disdonis flugfoliojn pri Esperanto kaj enkondukan materialon. Oni spertis multe da pozitiva intereso, precipe de junaj aktivaj studentoj kaj lingvistoj. Estis la unua fojo ke DEA partoprenis en la Socia Forumo, kaj tre bona komenco por daŭriga reprezento.

Ileana Schröder

39-A ILEI-KONFERENCO



La 39-a ILEI-Konferenco okazos de la 25-a ĝis la 29-a de julio 2006 en Parma kaj estas proponata kiel unu el la antaŭkongresaj eblecoj. Temo de la konferenco: Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj. La konferenco sesios en la Instituto Salesiano San Benedetto.

Estas diversnivelaĵoj tranokteblecoj en la konferenceto mem kaj en ties ĉirkaŭaĵo. La prezoj varias inter EUR 21,00 kaj EUR 75,00 (en tendo aŭ ruldomo 6,00 EUR, en amasloĝejo 3,00 EUR kaj memzorgado). Aliĝkotizo varias inter 15,00 EUR kaj 70,00 EUR depende de la kategorio kaj loĝlando de la aliĝanto. Por mendoj atingantaj nin post la 1-a de majo 2006 oni devas aldone pagi EUR 40,00. Post la 1-a de junio 2006 ni ne plu povos por vi mendi tranoktejon.

Kadre de la konferenco oni traktos temojn kiel ekzemple: lingvaj rajtoj en la lernejoj, edukmodeloj en pluretnaj socioj, modeloj kaj ekzemploj de interkultura edukado, kvalitaj lingvoinstruistoj por kvalita lingvolernado, instruado de lingvoj kiel formo de sociigo, esperanto en lernejoj kaj interkultura komunikado. Okazos scienca simpozio kune kun universitatanoj ne-esperantistoj, lingva festivalo kaj, interalie, sesio de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA. Oni planas komunan vojaĝon al UK post la konferenco.

Informoj pri la konferenco kaj aliĝilo estas haveblaj en hejmpaĝo de ILEI www.ilei.info kaj ĉe ILEI-estrarano pri konferencoj (aidute@mail.it .)

Aida Cizikaite

LATVIA ESPERANTO ASOCIO DECIDIS ALIĜI AL EEU

La la 14an de februaro estraro de Latvia Esperanto Asocio (LatEA) en sia kunveno:

1. Decidis aliĝi al EEU.
2. Delegis kiel reprezentanton de Latvia Esperanto Asocio en Ĝeneralan Asembleon de EEU Margarita Zelve.
3. Elektis kiel anstataŭanton de reprezentanto Aldis Buss.

Do mi estis elektita kiel reprezentantino de nia asocio en Asembleo de EEU.

Margarita Zelve



INTERNACIA INTERLINGVISTIKO EN POZNAŃ (POLLANDO)

Jam la 3-an fojon okazis septembre 2005 eksteraj postdiplomaj **studoj pri interlingvistiko** en **Poznań** (en la Universitato de Adam Mickiewicz – UAM, la dua plej granda universitato en Pollando).

Inter la 28-a de januaro kaj la 3-a de februaro okazis la dua sesio de la studoj, kiujn nun frekventas 25 gestudentoj el 12 landoj.

La internacia kursaro okazas en la Lingvistika Instituto sub la gvido de **d-rino Iona Koutny**, membro de la Akademio de Esperanto. Inter la prelegantoj estas konataj esperantologoj, kiel profesoroj John Wells, Humphrey Tonkin, Detlev Blanke kaj Michel Duc Goninaz, d-roj Vera Barandovska-Frank, Katalin Kováts (Smideliusz), Vilmos Benczik, Aleksander Melnikov, Blazio Wacha kaj Zbigniew Galor, krome Lidia Ligeza, Maria Majerczak, István Ertl kaj Aleksander Korĵenkov.

La Interlingvistikaj Studoj konsistas el enkonduko al ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, el internacia kaj interkultura komunikado, ili traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de esperanto.

Ĉiun trian jaron eblas komenci la studojn. La unua studjaro startis en la vintra semestro de la studjaro 1998/99. La unuaj gestudentoj finis siajn studojn en septembro 2002, dua grupo finis en 2005 kaj ekde septembro ekis tie jam la tria.



homojn, kapablajn ĉeesti tiajn diskutojn pri la lingva temaro kun la „cetera mondo“). Dank’ al la interlingvistikaj studoj (kaj d-rino Koutny, kiu eminenta zorgas pri la tuto) venas la ebleco eduki tiajn homojn – kiuj estonte certe estos granda kontribuo al la disvastigo de fakaj kaj seriozaj verkoj, studoj kaj diskutoj pri la temo interlingvistiko kaj Esperanto.

Hejmpaĝo de la studoj: <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/>

Peter Baláž, studento de interlingvistiko



KOMENCIĜAS LONGA KAJ MALFACILA BATALO

La lastatempa evoluo ĉe potencposedantoj en EU rilate lingvan politikon estas sufiĉe malkonvena por Esperanto. Post kelkaj klopodoj de esperantistoj oficiale evoluigi la konscion ĉe la instancoj pri la maljusta kaj ofte diskriminacia lingva politiko en EU (plendo de EEU ĉe EU-parlamento pro diskriminacio rilate la laboranoncojn, demando pri Esperanto kiel pera lingvo traktita en la EU-parlamento en la fino de la pasinta mandato (Komisiono Alba), demandoj pri Grin-raporto de la du radikalaj parlamentanoj...) la potenculoj rebatis. En novembro 2005 Eŭropa Komisiono rapide malfermis ttt-portalon pri multlingvismo <http://europa.eu.int/languages/en/document/74> (tiel rapide ke kelkajn dokumentojn ili aperigis sur ĝi en nur deko da lingvoj kaj ĝis februaro tiu nombro da lingvoj ankoraŭ ne vastiĝis (la informojn oni ankoraŭ ne povas ricevi en pli ol duono de oficialaj EU-lingvoj). En la dokumento aperis ankaŭ rimarkigo ke Eŭropa Komisiono ne povas subteni artefaritajn lingvojn, ĉar ili ne havas kulturon. Pro tio sendis leterojn al komisionano por kulturo kaj edukado Ian Figel kaj Renato Corsetti nome de UEA kaj mi nome de EEU. Mi ricevis respondon de persono kiun Ian Figel taskigis respondi. Tiun leteron kaj mian postan rean reagon mi aperigas ĉi-sube. Intertempe pluraj esperantistoj reagis pro tiu kaj simila alia aserto rekte skribante al la redaktoro de la portalo. Anonima redaktanto respondis al redaktoro de Libera Folio Kalle Knivilla simile kiel al mi parolante pri io pri kio li tute ne estis demandita. <http://www.liberafolio.org/2006/eulingvorespondo2/>.

Mia impresio estas, ke la burokrataro de EU ektimis pro la »ofensivo de esperantistoj« kaj decidis »fermi nian buŝon« klarigante ke ni ne havas ŝancon kaj ke ni ĉesu tedi ilin. Mi estas konvinkita, ke tiun »difinon« en rimarko 5 elpensis iu burokrato kaj ke ĝi estis neniam traktata en iu organo de la Komisiono, tial ili uzas klasikajn politikajn trukojn respondante al niaj demandoj per »nenio«. Antaŭ ni estas malfacila kaj »dura« batalo. Tamen la unuan venkon ni jam havas. Legu ĉe <http://www.liberafolio.org/2006/eulingvorespondo3/>

Europa Komisiono

Ĝenerala direktoro por edukado kaj kulturo

Direktoraro A – tutviva lernado. Politikoj de instruado kaj fakedukado

Unuo 5 – politiko de plurlingveco

Bruselo, la 13-an de januaro 2006

A5/PH/mb D(2006)175

Zlatko Tisljar

Sekretario de Eŭropa Esperanto Unio

Besednjakova 1

2000 Maribor, Slovenio

Nova kadra strategio por plurlingvismo

Estimata sinjoro Tisljar,

Plej multan dankon por via letero de la 15a de decembro 2005. La titolito, sinjoro komisionano Figel petis min respondi al ĝi.

Apudmetite troviĝas slovenlingva mesaĝo, kiun Eŭropa Komisiono aprobis la 22-an de novembro 2005.

En la teksto al kiu koncernas via letero estas ree indikita (eble tro mallonge) la longdaŭra opinio de la Komisiono pri artefaritaj lingvoj (nomitaj ankaŭ »kunmetitaj« aŭ »fonditaj« lingvoj).

Nia politiko stimuli lernadon de lingvoj kaj lingva diverseco en multlingva Eŭropa Unio fontas el la deziro ne nur faciligi komunikadon inter unuopuloj, sed ankaŭ stimuli ŝtatanojn por kompreni kulturojn de najbaroj, tiel ke ili eniru la pensmanieron, kiun esprimas lingvo de najbaro. Kunmetita lingvo tion ne ebligas.

Nia politiko pri lingvoj, kiuj estas uzataj por komunikado ene de Eŭropa Unio kaj inter uniaj civitanoj baziĝas je multlingva modelo. La kaŭzo por tiu plurlingva bazo estas la postulo, ke la civitanoj devas povi kompreni leĝdonadon, kiu ilin koncernas kaj la plej bona maniero certigi tion estas publikigi la leĝojn en lingvoj, kiuj jam estas uzataj en naciaj kadroj. Kunmetita lingvo ne povas kontentigi tiun celon. Se pri ĉiuj aktivadoj de EU ni perforte enkondukus ununuran lingvon, kunmetitan aŭ naturan, tio ekskludus multajn civitanojn el la partopreno en demokratiaj procedoj kaj konsekvence la Unio estus malpli efika, malpli klara kaj malpli leĝobeata.

Estime via

Jacques Delmoly
Ĉefo de la Unuo:

Estimata sinjoro Figel!

Dankon por respondo al mia letero de la 15a de decembro, kiun vianome skribis sinjoro Jacques Delmoly (A5/PH/mb D(2006)175).

Bedaŭrinde, li respondis al neniuj el miaj kvar demandoj sed skribis pri aferoj pri kiuj mi ne demandis.

Tial mi refoje petas respondi al la kvar konkretaj demandoj:

En la rimarko 5. je la paĝo 3 de la dokumento de Eŭropa Komisiono Communication on Multilingualism je la 22-a de novembro 2005 troviĝas la sekva aserto (mi citas en la germana, ĉar bedaŭrinde la teksto en la slovena ankoraŭ ne estas tie):

Das Verstehen anderer Kulturen wurzelt im Erlernen der entsprechenden Sprachen, die Ausdruck dieser Kulturen sind. Daher foerdert die Kommission die Verwendung kuenstlicher Sprachen nicht, die per definitionem keine kulturellen Bezuege haben.«

1. Kiuj estas baze de tiu aserto »artefaritaj lingvoj«?
2. Kiu difinis diferencojn inter artefaritaj kaj aliaj lingvoj?
3. Kadre de kiu kunveno kaj en kiu organo akceptis la Eŭropa Komisiono la supre menciitan konkludon?
4. Se la EU opinias Esperanton kiel artefaritan lingvon, kiu »per definitionem« ne havas kulturreferencojn, ĉu tiukaze libroj originale skribitaj en tiu lingvo (pli ol 30.000 titoloj), artikoloj en Vikipedio (pli ol 30.000), milionoj da interretaj paĝoj kun enhavoj en tiu lingvo, kelkdek mil personoj kies unu el gepatraj lingvoj estas Esperanto, estas fantomaj fenomenoj kiuj ne havas rilaton al kulturo?

Mi estas devigita informi pri tio ĉirkaŭ duonmilionon da eŭropaj civitanoj, kiuj uzas Esperanton apud aliaj de ili konataj lingvoj kaj dialektoj .

Kun amikaj salutoj,
Zlatko Tišljarić,
Sekretario de EEU

Eŭropa Bulteno. Februaro 2006. № 2 (44)
Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 25-an de februaro 2006.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Peter Baláž, Seán Ó Riain, Ileana Schrøder, Aida Cizikaite, Margarita Zelve, Zlatko Tišljari kaj Vesna Obradović

Leterojn kaj komentojn sendu al la seretario de EEU: zlatko.tisljar@azm-lu.si

Kontaktoj: komunikadcentro@esperanto.org kaj vesna.obradovic@email.si

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>